# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 70. Decembro 14, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Frank Lappe.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 360 KB. Alkroĉaĵoj: sen Sume: KB 400.**

**Agrablan festadon de la Zamenhofa Tago!**

**La Tago de Homaj Rajtoj: Por nia komunikado kun la mondo**
**La Zamenhofa festado: nia propra movada memor-tago**

## La universitata rondo: uzu la rimedojn de Erasmus

La kunpensigado de la 4-a de decembro estis tre utila kun partopreno de gekolegoj el Barato, Britio, Ĉinio, Francio, Hispanio, Irano kaj Serbio. Venis raportoj pri okazintaĵoj diverslandaj, aparte pri kursoj por profesoroj en Hispanio kaj pri okazaĵoj en Zaozhuang, Ĉinio, pri kiuj EKO abunde raportis. Plie, ni diskutis proponon de Radojica Petroviĉ pri ebla utiligo de la fondaĵo *Erasmus Mundus* por internaciaj kursoj, al kiu temo ni revenos en postaj kunvenoj.

Laŭ raporto de Renato Corsetti

## Salut-mesaĝo al la dekjara Universitato Zaozhang

La labor-grupo 'Esperanto en Universitato' de UEA. ILEI, TEJO kaj ESF havas la plezuron sendi gratulojn al la Universitato Zaozhuang kaj al la prizorgantoj de la Esperanto-Muzeo okaze de ĝia 10-jariĝo. Nia grupo, kiu okupiĝas pri kunligado de la agantoj por Esperanto en universitatoj de ĉiuj landoj, bone konscias pri la kontribuo al instruado de Esperanto, kiun donis kaj pludonas la universitato Zaozhuang kaj pri la ĝenerala kontribuo al la Esperanto-kulturo, kiun proponis kaj proponas la Esperanto-Muzeo, kiu estas la plej granda kolektejo de materialo pri la internacia lingvo en Azio kaj do estas je la dispono ne nur por la studentoj de Zaozhuang, sed de la tut-aziaj esploristoj pri la historio kaj la kulturo de nia monda lingvo.

Neniam kiel en nia maltrankvila epoko la idealoj de la movado por monda neŭtrala lingvo, idealoj pri egaleco inter individuoj, popoloj kaj kulturoj kiuj estas la plej sekura bazo por paco en justeco, estis pli indaj je atento de tiuj, kiuj strebas al pli bona mondo bazita sur kunlaboro kaj ne sur trudo de la propra mondkoncepto per la forto.

En tiu spirito ni alvokas ĉiujn gekolegojn laborantajn en universitatoj ĉie en la mondo kontakti nian grupon kaj kunlabori por progresigi la instruadon de la monda lingvo kaj

ĝia kulturo en universitatoj, kiuj estas la ĝusta loko por subteni la idealojn de justeco, interkompreniĝo kaj paco. Fine ni sendas varman personan saluton al s-ro Semio (Sun Minĝiao), dumviva membro de UEA kaj iniciatinto de la Esperanto-Muzeo.

Renato Corsetti, por la labor-grupo 'Esperanto en Universitatoj'

## Eŭropo restu multlingva

Se vi volas partopreni la kampanjon kontraŭ la uzo nur de la angla en la ĉefa emblemo uzata de EU, *You are EU*, nun vi povas trovi en la reto afiŝeton disvastigeblan al vialandaj lingvodefendaj asocioj kaj ĝenerale en la reto.

https://uea.org/vikio/Kategorio:Kampanjo_Esperanto_por_multlingva_E%C5%ADropo

Bonvolu helpi teni Eŭropon eŭropa! Se ne ni faros tion, neniu faros.

Renato Corsetti

## Kunsido pri la Zamenhofa Festo

Pro la relative granda partopreno oni devis movi la afiŝojn kaj tekstojn al alia adreso:

https://drive.google.com/drive/u/1/folders/1uare_vXIa_0bV26vvIrWmiEv9l5ymKDV

## Facile estas legi en la Tago de la Libro

https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/anka%C5%AD-vi-povos-legi-r400/

## Albanio perdis sian Eo-prezidanton

Shaban Hasani estas eble unu el miaj plej malnovaj amikoj, jam de 62 jaroj. Mi vizitis lin en la vilaĝo Petkaj de la regiono Shëmri de la distrikto Kukës. Li estas la frato de Hasan, mia samklasano en la mezlernejo militista Skënderbej (1959-1960). Shaban estas samaĝa kiel mi. Li finstudis pri konstru-inĝenierado; ekde la komenco nin kunigis la lingvo Esperanto. Ambaŭ ni sekvis tiam en 1961 la lernokurson de la internacia lingvo en la eksa kulturdomo *Ali Kelmendi* en Tirana. Ni kune abonis la internaciajn revuojn en tiu lingvo, ĉefe tiujn de El Popola Ĉinio, Vjetnamio kaj Laoso. Ni ekkorespondis kun esperantistoj el diversaj landoj de la mondo. Jarojn pli poste,



ni eksciis ke nia korespondado kun eksterlando estis sekvata de la Ŝtata Sekureco, tial ni rezignis pri ĝi. Ni atendis la jaron 1991, kiam fondiĝis la neregistara Asocio Esperantista Albana. Shaban estis ĉiam ties estrarano kaj poste ĝia prezidanto. Shaban, danke al la Pasporta Servo, vizitis fremdajn esperantistojn. Kiel triste ke ni ne plu havas lin en la Asocio, en la familio, en la amikeca rondo. Liaj gefiloj, Ilirjan, Ermir kaj Tatianaj honorigis lin ĉie ajn. Ni rememoros Shaban respektoplene kaj ameme por ĉiam!

Koncizigo de teksto de Bardhyl Selimi

## Francio kaj Togolando ligitaj pluse

*Esperanto Plus* naskiĝis en Togolando kaj ni ja intencas uzi tiun bazon por antaŭeniri kune kun niaj geamikoj: Adjevi, Judith kaj Koffiĉe. Jen tri esperantistoj de Lomeo al kiuj ni deziras konfidi la novan impeton de nia asocio. Temas pri lumtura grupeto kiun ni nomas "Togo Plus".

La ideo revigligi niajn agadojn kongruas kun la internacia evento de la Universala Kongreso kiu okazos por la unua fojo sur afrika grundo: en Tanzanio!

Ĝis nun, *Esperanto Plus* subtenas ses homojn, en Togolando, Madagaskaro, Sud Kivuo (Kongo DR) kaj ĝuste en Tanzanio. Jam temas pri neneglektinda eko, sed kiam Afriko entenas 55 suverenajn landojn, la estonto estas grandioza. Estus granda antaŭpaŝo se, sine de tiu kongreso, multaj afrikaj landoj estus reprezentitaj kadre de nia asocio.

Ni proponas al vi partopreni la defion, vekante la intereson de viaj konatoj por krei novajn grupojn cele al disvastigo de la internacia komunikado kaj Afriko. Ni volas havigi ĉiajn ilojn por diskonigi Esperanto Plus, ekzemple per filmetoj, jen nia unua: https://youtu.be/4NePL34Qu0g. Ni volas kunlabori kun la grupeto «Esperanto Plus» en Togolando por konfidi al ili la taskon revigligi Esperanton tie, kaj ĉefe sur la afrika kontinento. Ni volas stimuli deziron por vi kaj niaj amikoj subtenataj de nia asocio por plifortigi la amikajn ligojn, la interesajn interŝanĝojn pri la vivo de ĉiu. Studu la subtenpetojn el Afriko.

**Nia projekto : https://esperantoplus.jimdo.com/**

Bretonio: https://esperanto-france.org/sympa/info/bretonio
Malabono: bretonio-malabono@esperanto-france.org
Abono: bretonio-abono@esperanto-france.org

Koncizigo de teksto de Jean-Pierre Marcq et Evelyne Rotellini

## Memore al Alan Bishop

**Alan** kaj **Jennifer** (*Jenny*) **BISHOP** estas esperantista geedza paro vivinta en *Hawthorn*, Viktorio kaj dum la lastaj jaroj loĝantaj en Britio. Jennifer Bishop estas Esperanto-instruistino aktiva en ILEI, membro de la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro kajkontribuis al la libro *La arto labori kune: festlibro por Humphrey Tonkin*. Alan Bishop, esperantistiĝinta en 1993, estas (nun emerita) profesoro pri Edukado de *Monash*-Universitato, Melburno, kie li multajn jarojn laboris ankaŭ la edzino, kaj interalie gvidis la artan programon de la UK 1997 en Adelajdo. Ambaŭ ekde la 1990-aj jaroj prizorgas la somerferian *Aŭstralian Esperanto-Somerkursaron* (AESK), kiu debutis en 1984, kaj kune en la 2000-aj jaroj ankaŭ plurajn jarojn flegis la projekton *"EKPAROLI", Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al la Rapidigo de Orientlingvo-Lernado kaj Instruado,* en unuagradaj lernejoj de Viktorio. Ekde 2006 ambaŭ aktive engaĝiĝas en Muzika Esperanto-Ligo, Alan Bishop kiel prezidanto, Jennifer kiel kasisto kaj vicprezidanto. Ambaŭ aktivas en la Asocio de Verduloj Esperantistaj, kaj interalie kun Sándor Horváth kaj Brian Currie reprezentis ĝin en la unua tutmonda kongreso de la Verdaj Partioj en aprilo 2001 en Kanbero.

## LEA kontraktis kun la universitato en Kaunas

La 6-an de decembro, 2023 en Kaunas okazis historia evento por la Litovia Esperanto-movado. Dum kunsido de la Rektoraro de la Universitato Vytautas La Granda estis solene subskribita kontrakto pri kunlaborado inter la universitato kaj Litova Esperanto-Asocio. La kontrakton subskribis la rektoro de la universitato prof. Juozas Augustis kaj la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, Povilas Jegerovas. Dum la solena ceremonio partoprenis ankaŭ la esperantistoj Asta NASTARAVIČIŪTĖ, Aida ČIŽIKAITĖ, Virginija GURSKIENĖ, Danutė STATKUVIENĖ kaj Gražvydas JURGELEVIČIUS. Partoprenis ĉiuj membroj de la Rektoraro – la rektoro, vicrektoroj, dekanoj de la fakultatoj, direktoroj de la institutoj, kancelieroj de la akademioj, katedro-estroj, direktoroj de kelkaj departementoj kaj aliaj gravuloj -- entute pli ol 30 personoj. La kontrakto antaŭvidas enkondukon de la instruado de Esperanto kiel elektebla studobjekto en la Instituto de Fremdaj Lingvoj, donacon de

la biblioteko de Litova Esperanto-Asocio al la Universitato, organizadon de komunaj aranĝoj (inter ili de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2025), instigon al la studentaj diplomverkoj pri interlingvistiko, esperantologio, lingva politiko, lingva planado kaj similaj temoj. La Universitato ankaŭ disponigos ejojn por bezonoj de Litova Esperanto-Asocio. Ni efektivigos komunajn eldonprojektojn k.s.

Povilas Jegorovas

## Fondaĵo Canuto subtenis 500 membriĝojn en UEA

En 2023 la Fondaĵo Canuto, pri kiu agas via EKO-redaktoro, subtenis pli ol 500 membriĝojn el UEA. Antaŭ pluraj jaroj estis pli ol 700, do malkreskas iom la bezono.

## Mediteranea paradizo

La Mediteranea Esperanto-Semajno 2024 estas preskaŭ kompleta! Restas nur kelkaj ebloj partopreni. La aliĝoj finiĝos kiam la restadejo pleniĝos, aŭ maksimume la 31-an de decembro 2023. Ĝi okazos **de la 9-a ĝis la 16-a de marto 2024**, en la hotelo Miléade en **Les Issambres**, apud la Mediteranea marbordo en Suda Francio. La semajno inkluzivos **Esperanto-kursojn** je tri niveloj kaj distran programon kaj ekskursojn por profiti la belan veteron de la Lazura Marbordo. La kursgvidantoj estos:

nivelo 1 (komencparolantoj): Rodica TODOR (Rumanio)
nivelo 2 (progresantoj): Szilva SZABOLCS (Pollando)
nivelo 3 (fluparolantoj): Mirejo GROSJEAN (Svisio)

Pli da detaloj aperas sur la retejo de Esperanto-Provence aŭ vi povas sendi al ni retmesaĝajn demandojn. Filmeto prezentas la eventon. Spektu ĝin!
Estas nur limigitaj ebloj partopreni. Do indas aliĝi rapide!

## Homaj rajtoj restas en la fokuso

La Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj okazigos forumon “Lingvo kaj Homaj Rajtoj” la 18-an de decembro por festi la 75-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Artikolo 2 de la Deklaracio asertas rajton je nediskriminacio surbaze de lingvo. Prof. Robert Phillipson, monde konata specialisto pri lingvaj rajtoj, esploros la ligon inter lingvo kaj homaj rajtoj kaj la kreskantan rekonon de lingvaj homaj rajtoj en nacia kaj internacia juro. **La kunsido okazos per Zoom, ekde 15:00 UTC.** Oni antaŭvidas interpretadon en la angla, franca kaj hispana. Partoprenos reprezentantoj de neregistaraj organizoj, UN-funkciuloj kaj fakuloj pri lingvoj. **Limdato por aliĝo: la 15-a de decembro.** Aliĝilo en la angla:
https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSfF-BOF5bKw-k9gPoiYjza7aaxf3FesC3DsaGLKxZyXh50vGQ/viewform

============= vortoj: 1540 =============

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj al anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.